

## Decidoj de la Komitato de ILEI faritaj rete en 2012

De plej freŝa ĝis plej malnova. Kompilis SMG 16an de januaro, 2013.

### Voĉdono Komitata 5-2012, inter la 30a de nov. 2012 ĝis la 4a de januaro 2013. 35 voĉoj.

#### 5-2012 – propono 1

La komitato akceptis la ligan buĝeton por 2013, kiel proponite de la kasisto kaj estraro.

La buĝeto kun mallonga komentario videblas ĉe ‘Dokumentoj > Financoj’.

Akceptita per JES 35, SINDETENOJ 0, NE 0

#### 5-2012 – propono 2

La Komitato akceptis la liston de C-landoj bezonataj por realigi ekde 2013 la komitatan decidon el septembro, 2012 por starigi novan membrokategorion valida por la plej nepagipovaj landoj de la mondo.

La listo videblas en la paĝo ‘Membriĝo al ILEI’, enirebla de la ĉefpaĝo.

Akceptita per JES 35, SINDETENOJ 0, NE 0

#### 5-2012 – propono 3.

La Komitato akceptis la aldonon de unua (sojla) nivelo al la komuna ekzamena programo de UEA kaj ILEI, konforme al la aldonita dokumento, kaj komisias al la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) ellabori novan enhavon por la ekzistantaj niveloj, cele al la starigo de supera nivelo. Ĝi plie komisias al IEK trakti kun ILEI kaj UEA pri definitivaj nomoj por la tri novaj niveloj, kaj pretigo de nova versio de la ekzamena regularo.

La dokumento videblas sub ‘Agado > Ekzamenoj’

Akceptita per JES 33, SINDETENOJ 2, NE 0

#### 5-2012 – propono 4.

La Komitato aprobas la aldonon de la dik-litere indikita frazparto al artikolo 7.3.2 de la Statuto de la Ligo:

“Sekcio povas esti fondata de minimume kvin membroj en tiu difinita teritorio, kiuj devas fariĝi en la jaro de la peto-ektrakto internaciaj membroj de ILEI; **kvin internaciaj membroj ĉiujare estas la minimumo por la plua ekzisto de la sekcio.**”

Akceptita per JES 32, SINDETENOJ 2, NE 1

#### 5-2012 – propono 5.

La Komitato de ILEI konsentis modifi la regularon pri reta voĉdonado por rapidigi la procezon. Anstataŭ trisemajna diskuta fazo kaj du-semajna voĉdoniga fazo, estos unu-semajna diskuta fazo kaj du-semajna voĉdoniga fazo.

Akceptita per JES 29, SINDETENOJ 4, NE 2

### Voĉdono Komitata 4-2012, okazinta inter la 30a de julio kaj la 31a de aŭgusto 2012.

#### 4-2012 – propono 1.

La Komitato akceptis la enkondukon de landkategorio C kiu kovru la landojn kun la plej limigita pagipovo, por kiu la kotizo estos 2 eŭroj por papera membreco kaj 1 eŭro por reta membreco. Tio

validu ekde 2013 kaj estu kiel eble plej baldaŭ diskonigita.

Rezulto aldonota. Abunde akceptita.

#### **4-2012 – propono 2.**

La Komitato akceptis la komitatan protokolon de sesio 2 en la konferenco de Kunmingo.

La dokumento troviĝas en la protokola parto de ĉi tiu paĝo.

Rezulto aldonota. Abunde akceptita.

#### **4-2012 – propono 3.**

La Komitato akceptis la komitatan protokolon de sesio 3 en la konferenco de Kunmingo.

La dokumento troviĝas en la protokola parto de ĉi tiu paĝo.

Rezulto aldonota. Abunde akceptita.

### **Voĉdono Komitata 3-2012, okazanta inter la 20a de junio kaj 8a de julio 2012.**

#### **3-2012 — propono 1.**

La komitato akceptis ke anstataŭantoj el Kunmingo rajtas esti loĝantoj de alia lando ol la nomuminta sekcio, se neniu de tiu teritorio ĉeestas.

Rezulto aldonota. Abunde akceptita.

#### **3-2012 — propono 2.**

La komitato akceptis ke unu persono en Kunmingo rajtas esprimi maksimume TRI voĉojn dum la komitataj kunsidoj, kondiĉe ke la anstataŭiga procezo estis korekte plenumita.

Rezulto aldonota. Abunde akceptita.

### **Voĉdono Komitata 2-2012, okazinta inter la 6a kaj 20a de marto 2012. Voĉdonis 36.**

#### **2-2012 — propono 1.**

La komitato akceptis la ligan buĝeton por 2012, kiel proponite de la kasisto kaj estraro.

La dokumento aperas ĉe [www.ilei.info](http://www.ilei.info) sub Dokumentoj > Financoj.

34 poraj voĉoj kaj 2 sindetenoj.

#### **2-2012 — propono 2.**

La komitato akceptis (per 34 poraj voĉoj kaj 2 sindetenoj) la proponatan novan regularon pri la Scienca Komitato de nia oficiala organo, *Internacia Pedagogia Revuo*, kaj taksis la Universitatan Komisionon ellabori suplementan gvidilon.

La dokumento aperas ĉe [www.ilei.info](http://www.ilei.info) sub Dokumentoj > Statuto kaj Regularoj.

34 poraj voĉoj kaj 2 sindetenoj.

## Voĉdono Komitata 1-2012, finiĝinta en la 23a de februaro 2012. Voĉdonis 39.

La komitato akceptis 15 modifetojn al la Interna Regularo de ILEI.

Dokumento kiu elstarigas la modifojn, kaj la nuntempe valida Interna Regularo troveblas sub Dokumentoj > Statuto kaj Regularoj.

Voĉdonis 39 komitatanoj

JES-voĉoj gamis inter 33 kaj 37, NE-voĉoj gamis inter 1 kaj 3, SINDETENOJ gamis inter 2 kaj 6.

	SUMO	JES	NE	SINDETENO
Modifo al punkto 7.1.6	39	37	0	2
Modifo al punkto 7.2.2.3	39	36	1	2
Modifo al punkto 7.2.3	39	33	0	6
Modifo al punkto 7.2.4	39	34	0	5
Modifo al punkto 7.2.5	39	35	1	3
Modifo al punkto 7.3.3.1	39	35	2	2
Modifo al punkto 7.3.3.3	39	33	2	4
Modifo al punkto 7.3.3.4	39	35	0	4
Modifo al punkto 7.3.3.6	39	33	1	5
Modifo al punkto 7.3.4.1	39	33	3	3
Modifo al punkto 7.3.4.2	39	37	0	2
Modifo al punkto 7.3.4.4	39	35	1	3
Modifo al punkto 7.3.4.7	39	36	0	3
Modifo al punkto 7.3.5	39	37	0	2
Modifo al punkto 7.3.7	39	35	0	4

En 2012, ni okazigis 29 komitatajn voĉdonojn, 16 en Kunmingo kaj 13 rete. En la retaj voĉdonoj voĉdonis inter 33 kaj 39 komitatanoj (el 55). Ĉiu propono estis akceptita.

Konciza resumo troveblas ĉe KOMITATAJ VOĈDONOJ de ILEI tra 2011 kaj 2012 – Resumo